


LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 5, nummer 4 (28) november-december 2012

Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.

Erkenningsnummer: P808228

V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel

Tel. + fax 011-73.20.47 – E-mail: pieter-jan.doumen@telenet.be

LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato
Jarkolekto 5, n-ro 4 (28): novembro-decembro 2012

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe: [http://
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html) .

Ĉiu rajtas plusendi aŭ kopii la revuon.

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47

Retadreso: pieter-jan.doumen@telenet.be

Redaktore...

Karaj Gelegantoj,

Vintro denove troviĝas antaŭ niaj pordoj kun longaj vesperoj, kiuj donas al ni tempon por legi libron aŭ rigardi interesajn televidajn elsendojn. Ĝi ofertas al ni ankaŭ bonan okazon sekvi perfektigan kurson de Esperanto kaj ĉeesti klubkunvenojn.

Bedaŭrinde ankaŭ Esperanto, kiel ĉiuj organizaĵoj suferas sub la 'konkurenco' de la modernaj amaskomunikiloj kaj la hedonismo, kies efekto estas, ke multaj, precipe gejunuloj, ne plu interesiĝas pri organizaĵoj kun humana celo. La maljunaj esperantistoj ĉe ni ne facile trovas junajn anstataŭantojn por transpreni la flagon. Ni tamen ne perdu la kuraĝon : en Sud-Ameriko, Azio kaj Afriko la entuziasmo por Esperanto estas granda.

Ankaŭ bedaŭrinde, ke mezaĝaj esperantistoj, kiuj antaŭ kelkaj jaroj entuziasme laboris por Esperanto, nun ŝajnas esti perdinta sian fajron por la afero. Tial mi volas alvoki ĉiujn tiujn personojn, ĉefe la limburganojn, bone pripensi la gravecon de nia unika mondlingvo por la estonteco de la mondo : egalrajteco por ĉiuj popoloj, ankaŭ sur la tereno de la lingvoj. For tiu mezepoka strebo de certaj landoj domini la aliajn politike kaj ekonomie !

Mi tamen deziras al vi agrablan legadon !

Pieter Jan Doumen


Plua historio de Esperanto (1)

(Verdere geschiedenis van het Esperanto)(1)
1. Provoj de reformoj de Esperanto

Fine de julio 1887 D-ro L.L. Zamenhof, okulkuracisto en Varsovio, eldonis la unuan lernolibron de sia *Internacia Lingvo* en la rusa. Baldaŭ poste li eldonis ĝin ankaŭ en la pola, la franca kaj la germana, kaj nur multe pli malfrue en la angla kaj aliaj lingvoj. Ĉi tiun libre-

ton li dissendis al multaj personoj, redakcioj de ĵurnaloj k.t.p. en diversaj landoj, kaj li aperigis anoncojn en la gazetaro. Baldaŭ li ricevis multajn aprobajn respondojn. Poste li eldonis ankaŭ duan libron kaj aldonon al tiu ĉi. La nomo *Esperanto*, pseŭdonimo de D-ro Zamenhof iom post iom fariĝis la nomo de la lingvo mem.

Inter tiuj, kiuj respondis favore al la unua broŝuro, estis pluraj, kiuj promesis lerni la lingvon, kondiĉe ke D-ro Zamenhof faros en ĝi la ŝanĝojn proponitajn de ili. La reformaj proponoj ne malofte forte interkontraŭis. Kion unu opiniis nepre ŝanĝenda, tion alia speciale aprobis. Plue iuj prezentis reformojn jam an-



Antaŭpaĝo de la ruslingva Unua Libro

taŭe provitajn de D-ro Zamenhof, kiuj montriĝis praktike neuzablaj. La ŝanĝemo pasis ne baldaŭ. Ĝi daŭris ĝis 1894, kiam D-ro Zamenhof, ekzameninte la proponitajn ŝanĝojn, kompilis projekton de reformita Esperanto laŭ la diversaj konsiloj. Ĉe la voĉdonado, en kiu partoprenis la tiamaj abonintoj de *La Esperantisto*, la granda plimulto malaprobis ĝin kaj decidis, ke Esperanto devas resti tia, kia ĝi estas. Kompreneble, ŝanĝado kaj eĉ diskutado pri ŝanĝoj ne estis bona propagando.

Malfacile, eĉ malsaĝe, estas disvastigi lernadon de lingvo, kiu morgaŭ eble estos aliigita, kaj sekve postulos relernadon.

La pozitiva gajno de tiu ĉi afero estis la vek-


ta kompreno, ke la plua agado por Esperanto bezonas firman netuŝeblan bazon. Tial dum la unua kongreso de Bulonjo-ĉe-Marŝo D-ro Zamenhof proponis tian bazon en la formo de sia verketo *Fundamento de Esperanto*.

La Fundamento entenas jenajn partojn: Antaŭparolo, Alfabeto, 16-regula Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro. La kongreso unuanime akceptis ĝin kaj poste komisiis al la Lingva Komitato gardi ĝin.

Dum kelkaj jaroj forestis reformaj proponoj ĝis la jaro 1907-a. Dum la mondekspozicio en Parizo en 1900 du francaj profesoroj, Couturat kaj Leau, fondis la *Delagacio por alpreno de Lingvo Internacia*. Tiu Delegacio konsistis el societoj kaj sciencistoj en diversaj landoj, kaj precipe la esperantistoj dum sep jaroj varbis tre multajn aliĝantojn. En 1907 tiu ĉi Delegacio, kun aprobo de pli ol 300 societoj kaj subskribo de pli ol 1000 sciencistoj, petis la *Internacian Asocion de la Akademioj* elekti la internacian lingvon, sed la Asocio deklaris sin nekompetenta fari tian elekton. Nun la Delegacio, en sufiĉe arbitra maniero, starigis komitaton por elekti la internacian lingvon. Kiel reprezentanton de Esperanto en tiu komitato D-ro Zamenhof elektis S-ron Louis de Beaufront, fama propagandisto de Esperanto en Francio, por defendi antaŭ tiu komitato Esperanton. La komitato kunvenis en Parizo kaj esploris multajn diversajn projektojn. Dum la lasta kunveno Louis de Beaufront, anstataŭ defendi Esperanton, proponis alian projekton, verŝajne de li mem reformitan Esperanton, poste nomitan Ido (ido de Esperanto), laŭ li speco de 'pliboni-gita Esperanto', kaj je la granda surprizo de ĉiuj interesiĝantoj la komitato akceptis "principe Esperanton, sed kun la ŝanĝoj montritaj en la projekto Ido".

Sed per tio la komitato efektive transiris la limon de sia tasko, kiu estis nur elekti unu el la ekzistantoj lingvoj aŭ projektoj, sed ne ŝanĝi ilin aŭ mem prezenti novan lingvon.

Nun la komitato petis la Lingvan Komitaton de Esperanto aprobi ĉi tiun decidon, sed sendis al ĝi nur 25 ekzemplerojn de la Ido-gramatiko por ĝiaj pli 100 membroj, postulante respondon post nur unu monato, kvankam multaj membroj de la Lingva Komitato loĝis tiel malproksime, ke tio tute ne estis ebla. La plej multaj membroj de la Lingva Komitato, kaj ankaŭ la plej multaj aliaj esperantistoj, kun indigno malaprobis la decidon de la komitato kaj daŭrigis labori por Esperanto. Dum kelkaj



jaroj la komitato faris propagandon por Ido, sed ĝi neniam akiris tre multajn adeptojn.

Ido baldaŭ montriĝis tre malperfekta, kaj oni ĉiam denove faris en ĝi ŝanĝojn. Tio kompreneble malhelpis ĝian disvastigadon. Ĝia movado baldaŭ malfortiĝis, kaj nun preskaŭ ne plu ekzistas idistoj. La sola rezulto estis, ke multaj homoj perdis la intereson pri internacia lingvo.

Kvankam la idistoj nomis sian lingvon 'plibonigita Esperanto', ĝi estis efektive multe pli malfacila kaj neregula ol Esperanto mem. La akcento, la elparolo, la akuzativo kaj la uzado de afiksoj estis neregulaj, kaj estis enkondukitaj multaj novaj vortoj anstataŭ regule kunmetitaj esperantaj vortoj.

Lingvo konsistas ne nur el gramatiko, vortoj kaj kelkaj sintaksaj reguloj. Malgraŭ la netuŝebla fundamento restas ankoraŭ alireblaj multaj vojoj al naciigo kaj disdialektiigo. Tion D-ro Zamenhof vidis tre klare. Necesas koni kaj senti la spiriton de la lingvo. Tial li publikigis sian *Fundamentan Krestomation*. En la antaŭparolo li diris: "Mi eldonis la Fundamentan Krestomation, kiu povos servi al ĉiuj kiel modelo de esperanta stilo kaj gardi la lingvon de periga disfalo je diversaj dialektoj". Por krei tian stilan modelon D-ro Zamenhof zorge kolektis diversajn artikolojn, fabelojn, poemojn, partojn el libroj k.t.p., verkitajn de li mem aŭ de aliaj, kiujn li kunigis en tiu verko. La legadon kaj studadon de tiu ĉi verko li forte rekomendis al ĉiuj esperantistoj kaj precipe al tiuj, kiuj intencas mem verki en Esperanto, por ke ili ekkonu kaj alproprigu al si la internacian spiriton de la lingvo.

Kvankam modela laŭ stilo, la verko tamen ne estas absolute senerara. Ĝia valoro konkretiĝas ne en perfekta gramatiko kaj nereproĉebla esprimo, sed en ĝia *stila unuformeco*. D-ro

Zamenhof diris mem en sia antaŭparolo al la kvina eldono: “Dum la trarigardado mi trovis diversajn esprimojn, kiuj siatempe ŝajnis al mi bonaj, sed kiuj nun al mi ne plaĉas ». Ŝanĝi ilin li tamen ne diziris, ĉar li atribuis pli grandan gravecon al severa konstanteco ol la plena perfekteco. Plue ĝi enhavas dubajn formojn, pri kiuj ankoraŭ ne estas dirita la lasta vorto. Iuj jam trovis en la daŭro de la tempo sian solviĝon, sed aliaj ankoraŭ ne.

La rolon, kiun ludas la *Fundamento* sur la tereno gramatika, posedas la *Fundamenta Krestomatio* sur la tereno stila. Ĝia signifo por la esperanta literaturo estas tia, ke oni prave ĝin nomas : “La biblio de la esperantistoj”.

Ankaŭ post la tempo de Ido aperis novaj projektoj de internacia lingvo. La dana profesoro Jespersen publikigis ‘plibonigitan formon de Ido’, kiun li nomis *Novial*, kaj la estono de Wahl aperigis sian projekton *Occidental*, kiu estis bazita sur la okcident-eŭropaj lingvoj kaj havis aliajn gramatikajn kaj vortarajn regulojn. Aperis ankaŭ aliaj projektoj de ŝanĝita Esperanto de de Saussure kaj aliaj. Multe pli frue la itala profesoro Peano publikigis projekton de simpligita latina lingvo, *Latino sine flexione* aŭ *Interlingua*, kiu estis tute sen gramatikaj reguloj kaj sufiĉe arbitra. La angla profesoro Ogden publikigis tre primitivan sistemon nomatan *Basic English*, kiu konsistis el nur kelkaj centoj da anglaj vortoj. Ĉion ceteran oni devis esprimi per longaj priskriboj. Angloj kompreneble tre malfacile memorus kiun anglajn vortojn ili rajtas uzi aŭ ne. Ankaŭ la sveda profesoro Zachrisson prezentis proponon de simpligita fonetika skribita angla lingvo nomata *Anglic* kaj propagandis ĝin en Svedio. La projekto *Ofat* de la norvega policisto Olaf Farytad en Bergen havis intereson nur kiel kuriozaĵo.

Neniu el tiuj projektoj havis konsiderindan nombron da adeptoj. La aŭtoroj de pluraj el ili estis antaŭaj esperantistoj.


(El « *La Esperanto-Movado* » de Støp-Bowitz kaj Isbrücker)

Novajoj el Esperantolando

(*Nieuws uit Esperantoland*)

Brazilo – *Intraespo* por Eo-ekonomio –

Intraespo (tutmonda organizaĵo por la disvolvado de la esperantista ekonomio) estas brazila iniciato, kiu celas unuigi la entreprenistojn kaj memstarajn profesiulojn, profesiajn instruistojn kaj tradukistojn, jam sciantajn Esperanton kaj



interesiĝantajn pri la tutmonda uzo de Esperanto en ekonomio.

Ĉiam estis en Esperantio entreprenemaj homoj. Elstrara ekzemplo estas Teo Jung, la fondinto de la gazeto *Heroldo de Esperanto*. Nuntempe iniciatoj ekzistas sur la kampo de turismo, internacia komerco, eventoj kaj la eldona industrio en Esperanto, kiu daŭre aktivas. La elektronika komerco atendas la iniciaton de komercistoj. Profesia instruado de Esperanto havas bonajn perspektivojn kaj same la profesia tradukado.

Tamen la esperantistaj entreprenistoj kaj profesiuloj ĉiukampaj restas izolitaj. *Intraespo* prezentas sin per nova strategio eĉ tro kuraĝa kaj invitas la entreprenistojn kaj ĉiujn entreprenemajn homojn en Esperantujo al komuna agado laŭ la proponata strategio: disponigo de la necesa subteno pere de institucia stimul-agentejo, kiu starigos mondan reton de lokaj oficejoj, foje filioj, foje licencitaj oficejoj.

Entute *Intraespo* strebas al la kreado de negocoj kaj laborpostenoj kadre de la esperantista ekonomio.

Grava fakto tiurilate estas, ke Esperanto estas aprobita de la Ministerio de Turismo de Brazilo kiel laborlingvo. Laura Pereira de Alcântara estas la unua brazila profesiulo kiu aperigas la Esperanto-flagon sur sia nova indetigilo de loka turisma gvidistino.

(Henri Masson, France)

Argentino – *Esperanto kiel laborlingvo* –

La *Grupo Cooperativo de las Indias* (Kooparativa Grupo de la Indianoj) estas transnacia kooperativa reto dediĉita al la kreado, scio, retoj, produktoj kaj servoj por la aŭtonomigo de homoj, komunumoj kaj organizaĵoj per

pioniraj iloj, kiuj plibonigos la daŭrigeblon kaj elastecon de iliaj projektoj.

Fondita en 2005, ĝi laboras nun en Latina Ameriko (Montevideo kaj Bonaero) kaj Eŭropo (Madrido kaj Bilbao). La plej konata grup-estra kooperativo estas la *Sociedad de la Indias Electrónicas*. Ĝi kreis diversajn novaĵojn, i.a. la unuan entreprenoblogon en la mondo aŭ ret-servojn pri libera programaro. La plej granda enspezo de la Sociedad de la Indias Electrónicas havas sian originon en konsilado al diversaj grandaj organizaĵoj, fondaĵoj kaj registaroj pri organizado, teĥnologio kaj soci-ekonomia disvolvado.

En *La Indiana Kuriero* Manuel Ortega skribas: “Interne nia lernado de Esperanto superbe kaj rapide progresas. Esperanto pli kaj pli estas ‘la’ indiana lingvo. Ni volas profiti de la okazo danki al ĉiuj kiuj diversmaniere alprenis la taskon diskonigi nian decidon ekuzi Esperanton kiel laborlingvon, kaj al ĉiuj gratulintoj”.

(Henri Masson, France)

Ĉinio – Konferenco de ILEI –

La 45-a konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) estis solene malfermita en Kunming, urbo en sudokcidenta Ĉinio sabate la 21-an de julio. La inaŭguron ĉeestis senprecedenca kvanto da altrangaj oficialuloj. La konferenco okazis en la Profesia Artkolegio de Kunming kaj daŭris ĝis la 26-a de julio. La solena malfermo de la 45-a Konferenco de ILEI estis sendube la plej impona en la liga historio pro la multaj altrangaj ĉeestantoj. Surpodie sidis naŭ gravuloj, kaj ses personoj alparolis la 300-kapan publikon. Kompleta raporto kun fotoj farita de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, estas legebla ĉe Libera Folio.

(Libera Folio)

Hungario 1 – Elektronikaj libroj en E-o –

Elektronikaj libroj en Esperanto estas publikigataj ĉefe de tri eldonejoj: *Sezonoj* en Ruslando, la *Flandra Esperanto-Ligo* en Belgio kaj *Mondial* en Usono.

Por sondi la staton de tiu merkato Libera Folio petis la respondeculojn de la tri eldonejoj respondi al kelkaj demandoj pri la vendo de la elektronikaj libroj. Por FEL respondis Paul Peeraerts, por *Sezonoj* Aleksandr Korĵenkov kaj por *Mondial* Ulrich Becker. La tuta rezultinta artikolo estas legebla en Libera Folio ĉe <http://www.liberafolio.org/2012/elektronikaj-libroj-malrapide-progresas-en-esperantujo>.

(Ret-Info, Eventoj, Hungario)

Met de hartelijke groeten van
Kun la koraj salutoj de

KBC-Bank Hechtel

Rode Kruisplein 5
B-3940 Hechtel
Tel. 011-73.02.20
Fax 011-73.02.21
hechtel@kbc.be

Hungario 2 – Android adoptas Esperanton –

La poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj kiuj uzas la operacian sistemon Android baldaŭ aŭtomate havos ankaŭ esperantan klavaron. La klavaro laŭplane iĝos integra parto de la versio 4.2 de Android, aperonta komence de la jaro 2013-a. Laŭ Jakob Nordfalk, dana programisto kiu grave kontribuis al la enkonduko de Esperanto en Android, opinias la decidon grava, interalie ĉar Esperanto nun aŭtomate ankaŭ estos videbla en la listo de la enigaj lingvoj. La tuta artikolo estas legebla en Libera Folio ĉe <http://www.liberafolio.org/2012/esperanto-igos-integra-parto-de-android-telefonoj>.

La Arkeo de Noa retrovita (2)

(De Ark va Noah teruggevonden) (2)

La atejaj Bolĉevikoj, malamikoj de ĉiuj religioj, precipe de la kristanaj, decidis la membrojn de la ekspedicio kaj malaperigis la raporton kaj tiurilatajn dokumentojn, ĉar ilia publikigo estus metinta ilin en malkomfortan situacion. Malmultaj transvivis tiun masakron, kaj unu el ili estis Fjodor Froloviĉ Batov, kiu naskiĝis en 1895.

En 1945 la novjorka branĉo de la gazeto *Rossija*, publikigitaj de la blankaj rusoj, aperigis artikolon verkitan de kolonelo Aleksandr Koor, ekskomandanto de la rusa 19-a regimento Petropavlovskij en garnizono apud la monto Ararato. En tiu artikolo la kolonelo konfirmis la faktojn de la cara ekspedicio.

La rusoj en Rusio devis atendi ĝis 1994 por legi pri tiu ekspedicio, kiam la moskva gazeto *Nauk i Religija* (Scienco kaj Religio) publikigis ĝian historion, sed la eldonistoj persistis, ke ili ne povas konfirmi ĝian aŭtentecon.

Tiun artikolon legis s-rino Galina Loŝadkina. Ŝi tuj decidis skribi konvinkan leteron al la



Fjodor Froloviĉ Batov kaj lia edzino Maria Vassilievna okaze de ilia geedziĝo en 1917

eldonistoj, en kiu ŝi atestis, ke la rakontita historio estas vera, ĉar ŝia avo, Fjodor Froloviĉ Batov, partoprenis en la ekspedicio kaj rakontis al ŝi la tutan aventuron : kiel li vidis kaj tuŝis la Arkeon sur la monto Ararato (kiu en 1994 estis en la turkaj manoj). En sia letero S-rino Loŝadkina menciis Serafimoviĉ, vilaĝon en la regiono de Volgograd, kiel loĝloko de sia avo. La gazeto publikis sian tutan leteron.

Ŝi skribis i.a.: “Mi legis la artikolon *Iskatelji Kovĉega* (Serĉantoj de la Arkeo) de Vladimir Roskoviĉ kaj la manieron en kiu vi konkludis ĝin: ‘Ne estas eble konfirmi aŭ nei ĝian aŭtentecon’. Mi sentas min devigita konfirmi tiun raporton! Ĝi estas vera! Ĉio okazis tiu-maniere! Mi estas certa pri tio kion mi diras, ĉar unu el la membroj de la rusa ekspedicio al la monto Ararato estis mia avo, s-ro Fjodor Froloviĉ Batov. Mi ankoraŭ posedas lian militistan dosieron, en kiu estas enskribita lia enkorpusigo en la 19-a Regimento de Turketano en Ust-Bear, nuntempe Serafimoviĉ en la regiono de Volgograd.”

Tiun leteron legis la italo Roberto Tiso kaj lia edzino Paola, kiu decidis vojaĝi al Rusio kaj informi sin surloke. En vilaĝo je 100 km okcidente de Serafimoviĉ en la regiono de

Rostov ŝi finfine trovis s-rinon Loŝadkina, kiu miris pri tio, ke italino faris sola tiel longan vojaĝon por ricevi rektan pruvon pri la sperto de ŝia avo koncerne la Arkeo de Noa.

S-rino Loŝadkina rakontis, ke la sperto sur la monto Ararato funde ŝanĝis ŝian avon. La Bolĉevikoj daŭre minacis lin, tiel ke paroli pri la ekspedicio fariĝis tabua temo por iu ajn. Cetere la morto de tiom da kompanoj dum la grimpaĵo supren kaj malsupren forte skuis lin. Ŝia avo rakontis, ke la caro sendis al la monto elektitajn personojn kaj certe el la spirita vidpunkto. Profunda religia sento puŝis la caron organizi tiun ekspedicion. Poste Fjodor sekvis kurson pri religio dum kvar jaroj. Pro tio li estis akuzita de perfido al sia patrio kaj estis ekzilita kaj kondamnita al tri jaroj da punlaboro inter 1931 kaj 1933.

Kiam ŝi estis ankoraŭ infano en la sesdekaj jaroj, Galina iris al la lernejo, kaj iutage ŝia instruistino parolis pri la monto Ararato. Reveninte de la lernejo, ŝi rakontis al sia avo, kion ŝi lernis pri la monto. Tiam la avo rakontis al ŝi pri sia sperto sur la monto. Il diris al ŝi, ke oni atingis la Arkeon post multaj penoj kaj eĉ eniris en ĝin. Li kaj lia grupo certe ne estis la unuaj kiuj eniris en ĝin, ĉar videblaj spuroj estis postlasitaj de aliaj personoj (verŝajne armeniaj paŝtistoj). Li diris, ke du, tri personoj estis necesaj por ĉirkaŭpreni la ĉefan trabon en la arkeo. Laŭ analizo de pecetoj de la ligno, temis pri ligno de la rozkolora laŭro. Li rakontis, ke sub la Arkeo formiĝis lago kun glacimalvarma akvo. Li trinkis de tiu akvo, kio donis al li la senton esti forta.

Ŝia avo konsilis al ŝi rakonti tion al neniu, ĉar tio povus endanĝerigi lian vivon. Tamen la sekvantan tagon Galina rakontis al sia instruistino la historion de sia avo.

Iutage kiam ŝi estis ankoraŭ tre malgranda, ŝi rimarkis en malluma angulo de la domo de sia avo kofron, kiu estis tre zorge gardata. Pelite de scivolemo, ŝi malfermis ĝin kaj en ĝi, inter personaj objektoj de la avo, ŝi vidis peceton de ligno malmola kiel ŝtono. Ŝi petis de sia avino la permeson povi forĵeti tiun ŝtonon, sed la avino reagis sufiĉe bruske, ordonante al ŝi ne plu tuŝi tiun ŝtonon.

50 jarojn poste s-rino Loŝadkina komprenis la kaŭzo de tiu bruska reago de la avino kaj kio estis tiu ŝtono en la malnova kofro. Estis nenio alia ol peceto de la Arkeo de Noa, kiun ŝia avo reportis de la cara ekspedicio kaj ĵaluze gardis en tiu kofro.



Fjodor Frolovič Batov en 1954 kun sia familio.
En la mezo lia nepino, Galina, nun Loŝadkina.

Malfeliĉe la domo de la geavoj estis vendita, kaj neniu scias, kio okazis al la kofro, kiu estis restinta en ĝi. Ankaŭ la skizoj de ŝia avo malaperis dum la transloĝiĝoj. Antaŭ ol morti, la avo kaj poste la avino suferis de speco de vizaĝa paralizo, tiel ke ili ne plu povis paroli, kvankam ili deziris diri ion. Estis la kutimo gardi tiajn sekretojn ĝis antaŭ la morto. La avo mortis en 1969, la avino 10 jarojn poste.

Galina donis al Paola foton de sia avo, kaj Paola donis al ŝi kelkajn fotojn, kiujn ŝia edzo prenis sur la monto Ararato. Revojaĝante hejmen, ŝi restis kelkajn tagojn en Moskvo, kie ŝi kontaktis la eldonistojn de la gazeto *Scienco kaj Religio* por ricevi pli da informoj, sed ŝi ricevis nur kopion de la rusa artikolo, kiu aperis en ilia gazeto en 1994.

(*Revuo 'Science et Foi', Parizo*)

La mensogo pri kolesterolo (*De leugen omtrent cholesterol*)

En 2005 la germana profesoro D-ro Walter Hartenbach, hirurgo en la universitata kliniko de Munĥeno, publikigis libron pri la tiel nomata kolesterolo-problemo. La libro denuncas la plej grandan trompokampanjon sur la kampo de la medicino, kiun la mondo iam spertis. Ĝi konsistas el torento da malĝustaj asertoj pri kolesterolo far la nutraĵa kaj farmacia industroj.

Post dekoj da jaroj da esplorado pri malsanoj de la metabolo, koro, angioj kaj kancero, li ne povis trovi rilaton inter kolesterolo kaj arteriosklerozo. La libro enhavas la resumon de la rezultatoj de pli ol 6000 sciencaj esploroj, plejnumita far granda nombro da famaj eŭropaj kaj usonaj kolesterolesploristoj. Surbaze de tiuj sciencaj faktoj tiu ĉi libro volas reagi kontraŭ tiu trompo. La menciitaj industroj pagas nefindajn personojn de medicinaj fakultatoj kaj pseŭdomedicinaj institucioj por realigi sian in-

dustrian celon, nome la demonigon de la kolesterolo per fantaziaj kaj ofte plene sensencaj deklaroj, kiuj servas la reklamdevizojn de liaj sponsoroj.

Fatalaj estas ĉefe la statistikoj, kiuj estas mondvaste manipolataj de tiuj industrioj kaj glutataj kiel dolĉaj kuketoj far la plimulto de la kuracistoj kaj dietistoj. Al tio aldoniĝas, ke tiuj asertoj pri kolesteroltitroj en la sango (la kolesterolnivele) ebligas tiujn ĉi kuracistojn fari el ĉiu kolesterolpaciento dumvivan pacienton.

Por tiu propagandeca, pure komercacela demonigo de la kolesterolo la produktantoj de margarino kaj precipe la farmacia industrio, kiuj vendas la antaŭkolesterolajn rimedojn, pagas al la statistikistoj 50 ĝis 75 milionojn da eŭroj por unu statistiko. Tiajn sumojn ili volonte elspezas por sekretigi la negativajn rezulta-

Retiro de Lipobay kaŭzas panikon

Dekmiloj da germanoj devis senprokraste transiri al alia pilolo, ĉar Bayer retiris de la merkato la kontraŭkolesterolan *Lipobay*.

Tiu kuracilo estas rilatigata al la morto de 52 personoj. Dekmiloj da homoj kiuj glutas medikamentojn parencajn al *Lipobay*, demandas sin nun, kion ili riskas. *Lipobay*, kiu estis retirita de la apotekoj antaŭ nelonge, apartenas al la kemia klaso de la *statinoj*. Laŭ freŝdataj ciferoj pli ol ducent mil (200.000) germanoj glutas tiajn antaŭkolesterolpilolojn. Statinoj, kiel *Lipobay*, bremsas la formadon de kolesterolon en la korpo. Ili estas preskribataj al homoj kies kolesteroltitro en la sango estas tro alta kaj tial riskus ekhavi kor- kaj angimalsanojn. Sed *Lipobay* kaŭzas samtempe muskoldetruon, kiu sekvigas gravan domaĝon de la renoj. Laŭ la kuracilfabrikisto Bayer tio kaŭzis la morton de 52 personoj. La firmao eĉ ne ekskludas, ke tiu nombro povos pligrandiĝi estontece.

Ne nur *Lipobay*, sed ankaŭ aliaj kuraciloj de la sama speco povas kaŭzi problemojn al siaj uzantoj. En raraj kazoj temas pri detruo de muskolĉeloj, kio povas kaŭzi malbonan funkciadon de la renoj kaj eĉ morton. Ankaŭ febro kaj malvigleco estas kialoj de alarmo.

Ĉar statinoj povas kaŭzi muskoldetruon, estas konsilinde resti singarda kontraŭ febro. Konsultu kuraciston, se via urino estas ruĝebruna. Regule testigu vian sangon kaj kontroligu la funkciadon de via hepato.

Gazeto 'De Standaard', Belgio

**BOUW
EXPO
TEGELEXPO
MIX-BETON
BOUWMATERIALEN**

DE LAAGSTE PRIJS DE HOOGSTE KWALITEIT,
EN ONZE EXTRA SERVICE ZIJN ONZE KENMERKEN!

PAESEN

EEN ZAAK VAN VERTROUWEN !

TEGELEXPO ☎ 011 66 55 54
BOUWEXPO ☎ 011 66 55 50

tojn de la kolesterolmalaltigo kaj emfazi la supozatan influon de la kolesterolo sur la eblecon ekhavi korinfarkton, kvankam tiu influo estas demonstrata de nenia statistiko! Oni provas superblufi la medicinan mondon per la granda nombro de la esploristoj kiuj subtenas tiun demonigan kampanjon.

La plimulto de la plenumitaj esploroj ne povas trapasi seriozan sciencan kritikon. La risko de korinfarkto kaj kancero ŝajnas eĉ pligrandigi per la uzo de kolesterolmalaltigaj rimedoj ! Pli alta kolesteroltitro egalas eĉ al pli malaltaj risko pri kancero ! Oni facile renoncas al esploro pri la faktoroj rilataj al kolesterolo, ĉar al la plimultaj kuracistoj mankas scioj pri la kolesterola metabolo. La skandalo ĉirkaŭ *Lipobay* estis rapide forgesita.

(Traduko de la libro en la nederlandan lingvon sub la titolo *De Cholesterolleugen* aperis ĉe la eldonajo Ankh-Hermes en Deventer, Nederlando. ISBN 90 202 4394 2.)

Revuo 'Hildegardekoerier', Kortrejko)

La Usona Interna Milito (5)

(De Amerikaanse Burgeroorlog) (5)

Joe Johnston, la oponanto de Sherman en Georgio, deziris nek retiriĝi nek batali. Tial Sherman proponis al li pacakordon, kiun li akceptis, sed Vaŝingtono rifuzis konfirmi ĝin.


Laŭ Lincoln la Nordo povus nur gajni la militon, se granda nombro da veteranoj reenlistiĝus. La miriga nombro de 136.000 veteranoj pretis denove servi.

Grant devis resti en Virĝinio, kie la armeo de Lee troviĝis en tranĉeoj. Li provis teni Lee tiamaniere okupita, ke tiu ĉi povis nek interveni alie en la Suda Konfederacio nek preni iniciaton, kiel li kutimis fari.

Trans la rivero Rapidan troviĝis arbarego nomita Wilderness. Frumetene de la 5-a de majo 1864 la trupoj de Lee trairis ĝin kaj atakis la nordulojn. Ambaŭ nordaj flankoj estis ĵetitaj malantaŭen de Lee, sed generalo John Sedgwick alkondukis novajn nordajn rezervojn kaj formis novan linion. Post du tagoj la batalo finiĝis, sed neniu vere gajnis ĝin. La norda armeo perdis 17.000 virojn, kaj ĝiaj flankoj estis disbatitaj.

La 7-an de majo Grant sendis la armeon al Spotsylvania, dek mejlojn pli suden. Li volis meti sian armeon inter Lee kaj Richmond por devigi Lee ataki lin. Sed Lee alvenis tie la unua, kaj nova batalo komenciĝis. Dum dek tagojn ambaŭ armeojn turniĝis tri kvaronojn de cirklo. Ili batalis per bajonetoj kaj muskedkolboj kaj tiel proksimiĝis al la rivero James, kie Grant senmovigis la armeon de Lee, tiel ke ĝi povis nur batali, sed li ne sukcesis venki ĝin.

Komence de junio Grant denove atakis Lee, provante neniigi ties armeon. La armeoj restis en kontakto dum tuta monato, kaj Grant perdis 2000 virojn ĉiutage, sed ne sukcesis venki Lee! Finfine Grant atakis Petersburg sur la suda bordo de la rivero Appomattox. Petersburg gravis, ĉar ĉiuj provizoj por la ĉefurbo Richmond kaj ĝiaj defendantoj venis per trajne de la Karolinoj tra Petersburg.



Robert E. Lee, la plej fama generalo de la milito, kiu neniam vere estis venkita.

Por forlogi Grant de tie, Lee sendis generalo Early kun eta armeo tra la valo Shenandoah en Okcidenta Virĝinio al Vaŝingtono, kie tiu ĉi kaŭzis grandan panikon. Sed Grant rifuzis malpezigi la premon sur Petersburg kaj sendis generalon Sheridan kun armeo al Vaŝingtono por forpeli Early kaj okupi la valon. Li ankaŭ sendis divizion da koloraj trupoj al suda fortikaĵo por rompi la sudan linion. La nigruloj luktis kiel leonoj, sed ili estis preskaŭ ĉiuj buĉitaj. Intertempe Grant detruis ĉiujn fervojojn deirantajn de Petersburg.

En aŭgusto Sherman eksieĝis la ĉefurbon de Georgio, Atlanta. Li forte bombardis ĝin, detruis la fervojojn kiuj ligis Atlanta kun la resto de la Sudo kaj bruligis ĉiujn magazenojn. Li forlasis la urbon brulanta (*vidu la romanon de Margaret Mitchell "Gone with the Wind"*). Li pasigis du monatojn ĉasante la sudan generalon John Hook, kiu kun 40.000 viroj molestis lian provizadlinion. Tiam li sendis Thomas kun armeo por persekuti Hook.

En novembro 1864 la norduloj reelektis Lincoln kiel prezidento de Usono.

Iom poste Sherman ekmarŝis kun 60.000 viroj al Savannah, haveno ĉe la oceano. Ekde tiam Sherman ne plu havis provizadliniojn kaj devis provizi sin surloke. Survoje li detruis ĉiujn plantejojn kaj permesis al siaj viroj ŝteli ŝinkojn kaj kokinojn, sed ili prenis ankaŭ arĝentaĵojn, horloĝojn kaj aliaj grandvalorajn objektojn, kiujn ili tute ne povis uzi. Miloj da sklavoj forlasis la plantejojn, sekvis lian armeon dum kelkaj tagoj kaj tiam malaperis.

Lia armeo atingis Savannah en decembro, kie li kontaktis la nordan ŝiparon por ricevi provizojn kaj telegrafi al Grant kaj Vaŝingtono. Li malpermesis priŝteladon kaj bone traktis la urbon, kiu havis garnizonon de 15.000 viroj, sed li nesingarde lasis ĝin eskapi.

Ekde Savannah li marŝis norden al Sud-Karolino, kie kvar jarojn antaŭe komenciĝis la milito. Sherman terure suferigis tiun ŝtaton pro tio, ke ĝi komencis la secesion kaj la militon. Li ŝtelis aŭ bruligis ĉion sur sia vojo kaj palisumis la kaptitojn! La ĉefurbo Columbia ricevis la tutan pezon de lia venĝo kaj kolero. Fajroj estiĝis, dum forta vento blovis. Preskaŭ la tuta urbo forbrulis.

La 7-an de marto 1865 Sherman enmarŝis Nord-Karolinon kaj tuj ŝanĝis sian konduton. Li ordonis al siaj oficiroj trakti la nord-karolinanojn tiel milde kiel eblis kaj informis la soldatojn, ke ŝtelado kaj bruligado estos punitaj

per pafmortigo. En Fayetteville li bruligis la konfederan arsenalon, sed nenion alian.

La 18-a de marto Joe Johnston atakis lian armeon apud Bentonville, sed devis retiriĝi. La 23-an de marto li eniris Goldsboro, kie Thomas denove aliĝis al li. Li nun denove komandis 80.000 virojn.

La 22-an de marto la norda generalo Wilson konkeris la ŝtaton Alabamo.



En la valo Shenandoah Sheridan detruis la tendaron de Early kaj la tutan valon kaj revenis al Grant, kies armeo troviĝis fronte al Richmond. La linioj de Grant estis nun plu ol 50 mejlojn (80 km) longaj kaj etendiĝis de Petersburg ĝis Richmond.

La sola espero de Lee nun estis povi forlasi Virĝinion kaj iri al Nord-Karolino por aliĝi al Joe Johnston kaj venki tie Sherman. Sed li devis atendi la finon de marto, kiam la vojoj estis denove ireblaj.

Frumatene la 25-an de marto kolono de la suda infanterio kaptis Fort Stedman, kiu estis parto de la norda linio en Virĝinio, provante rompi la linion de Grant. Sed la linio teniĝis bone, kaj la norduloj kontraŭatakis Lee, kiu perdis 5.000 virojn.

La 2-a de aprilo Lee forlasis Petersburg kaj Richmond kaj retiriĝis norden. Sed la konfederata provizadlinio tute kolapsis. La 9-an de aprilo 1865, je Palmodimanĉo, la kavalerio de Grant baris la vojon al la armeo de Lee, kiu estis ĉirkaŭita de la norda infanterio je tri flankoj. Tiam Lee sendis kurieron kun blanka flago kaj letero al Grant : li finfine kapitulacis.

Ambaŭ armeestroj kunvenis en salono de simpla domo en Appomattox Court House por diskuti pri la kapitulaco.

Lee, svelta kaj grizhara gentlemano, surhavis sian plej belan uniformon, kaj li venis kun nur unu staboficiro. Grant, malgranda kaj korpu-

Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio

Estintaj aktivaj:

Ĵaŭdon, la 27-an de septembro 2012:

Malgraŭ la komunumaj elektoj kolektiĝis en la kutima lokalo 7 esperantistoj por ludi skrablon sub la gvido de An Olijslagers. Kvar teamoj estis formitaj. La teamo de Ben Indestege kaj lia juna edzino Hadi (el Ukrainio) gajnis. Gratulon al ili, ankaŭ kaj precipe pro ilia geedziĝo!

Ĵaudon, la 25-an de oktobro 2012:

Naŭ personoj partoprenis en la interaktiva vespero pri "Esperanto kaj paco", gvidata de Ralph Schmeits, de UEA. Du genovuloj, Joop kaj lia edzino el Brazilo, Kadigia ĉeestis. Ĉiuj partoprenantoj rakontis proprajn spertojn pri siaj kontaktoj kun fremdlingvanoj. Post la paŭzo ĉiuj ĉeestantoj ricevis esperantan proverbon rilatan al paco, kiun ili laŭvice eksplikis.

Estontaj aktivaj:

Ĵaŭdon, la 29-an de novembro 2012:

Jan Doumen voĉlegos el la libro "Zamenhof" de Marjorie Bouton pri la juneco de Zamenhof.

Ĵaŭdon la 20-an de decembro 2012:

Festmanĝo okaze de la naskiĝdatreveno de Zamenhof en la restoracio "Oud Stadthuys" (antaŭa Boskop), Markt 1, Peer. Komenco je la 19.30 horo. Prezo laŭvola. Partneroj estas tutkore bonvenaj. Anoncu vin al Rik Leijskens, tel. 089-85.47.41 antaŭ la 13-a de decembro.

lenta nigrahara viro, estis en siaj ĉiutagaj vestaĵoj, sen sabro, kaj kun li venis ses oficiroj. Ili premis la manon unu al la alia kaj sidiĝis ĉe du apartajn tablojn.

Grant ŝajnis embarasita, kiam li renkontis la grandan sudan generalon. Por malstreĉi la etoson, li komencis paroli pri la meksika milito, kiam Lee estis staboficiro de ĉefkomandanto Winfield Scott, kaj Grant nur simpla regimenta kantonmentestro. Sed Lee memorigis lin pri la afero, pro kiu ili kunvenis.

Tiam Grant prenis kraĵonon kaj skribis:

La suda armeo devas kapitulaci de la plej alta oficiro ĝis la plej malalta soldato.

Ĉiuj publikaj proprajoj estas transdonendaj al la Usona Armeo – batalflagoj, fusiloj, kanojoj, muskedoj, vagonoj, ktp.

La oficiroj povas gardi siajn sabrojn kaj ĉevalojn, sed la suda armeo kaj ĉio kion ĝi reprezentas, ĉesas ekzisti.



Grant kaj Lee subskribas la pactraktaton.

Ĉiuj oficiroj kaj soldatoj estas liberaj reiri al siaj hejmoj, post kiam ili ĵuris ne plu batali kontraŭ la Unio.

Ili neniam estos persekutataj pro perfido kaj neniam estos ĝenataj de usonaj aŭtoritatoj, tiel longe ke ili restos fidelaj al sia ĵuro.

Lee legis la tekston, kaj rimarkis, ke ĉiuj ĉevaloj de la suda armeo apartenas al la oficiroj kaj soldatoj mem. Grant rifuzis ŝanĝi la tekston, sed promesis redoni la ĉevalojn al ĝiaj posedantoj, kiuj plejparte estis kampuloj kaj bezonis ilin.

Tiam Lee eliris, grimpis sur sian blankan ĉevalon kaj forraĵdis, dum Grant kaj ĉiuj oficiroj salutis lin. Lee salutis ilin siavice.

Tiam Grant aŭdis kanonpafadon: nordaj artilerianoj pafis por festi la venkon. Sed Grant tuj ordonis ilin ĉesi tion, dirante, ke tiuj homoj en grizaj uniformoj ne plu estas malamikoj, sed samlandanoj, kaj ke oni faru nenion por humiligi ilin.

Anstataŭe li lasis vagonojn kun federaj provizoj cirkuli en la konfederala tendaro, kaj la malsataj viroj de Lee ricevis bonan manĝon. Grant mem preparis sin por vojaĝi al Vaŝingtono por raporti al la prezidento.

La 15-an de aprilo 1865 prezidento Lincoln estis murdita de la aktoro Wilkes Booth, fanatika favoranto de la suda sendependeco, dum la prezidento ĉeestis teatraĵon kun sia edzino.

Ankoraŭ nun li estas konsiderata kiel la plej granda prezidento de Usono. Vic-prezidento Andrew Johnson sukcedis lin. Havante por sudan simpatian, tiu ĉi provis stopi la emancipadon de la negroj. En 1868 Grant estis elektita kiel la 18-an prezidenton de Usono. Daŭrigante la politikon de Lincoln, li estis reelektita en 1872.

(Laŭ 'This Hallowed Ground' de Bruce Catton, resumita kaj tradukita de P.J. Doumen)

Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono
Redaktore...
Plua historio de Esperanto (1) (*Støp-Bowitz kaj Isbrücker*)
- Paĝo 4: Novaĵoj el Esperantolando:
- Brazilo: Intraespo por Eo-ekonomio (*Henri Masson, Francio*)
- Paĝo 5: - Argentino : Esperanto kiel laborlingvo (*Henri Masson, Francio*)
- Ĉinio: Konferenco de ILEI (*Libera Folio, Hungario*)
- Hungario 1: Elektronikaj libroj en Esperanto (*Ret-Info, Eventoj, Hungario*)
- Hungario 2: Android adoptas Esperanton (*Libera Folio, Hungario*)
La Arkeo de Noa retrovita (2) (*Revuo Science et Foi, Parizo*)
- Paĝo 7: La mensogo pri kolesterolo (*Revuo Hildegardkoerier, Kortrejko*)
- Paĝo 8 : La Usona Interna Milito (5) (*Laŭ libro de Bruce Catton, Usono*)
- Paĝo 10: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio.

Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratan solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

Leer Esperanto!

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatika heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

Apprends l'Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d'une langue supranationale. Seul l'Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d'égalité. Ce n'est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n'a pas d'exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l'empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n'a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l'Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n'ont pas la même langue maternelle.